## MONDA TAGO DE LA GAZETARA LIBERECO

### kaj la sinteno de la Esperanto-movado

https://eo.wikipedia.org/wiki/Monda_Tago_de_Gazetarlibereco

La 3a de majo estis proklamita kiel Internacia (aŭ Monda) Tago de la Gazetara Libereco. Ŝajnas, ke ne apartenas al la tradicio de la Eo-movado (vomado) aparte honori ĉi tiun tagon (kvankam tiu ĉi movado/vomado kutimas fanfaroni pri plej diversaj aliaj Mondaj Tagoj proklamitaj de UN/Unesko.

Ankaŭ la Tago de la Gazetara Libereco estis iniciatita de Unesko kaj enkondukita de la Ĝenerala Asembleo de UN la 20an de decembro 1993. Kial la Eo-movado (vomado) ne aparte honoras tiun ĉi tagon, ne estas klare.

Konante la karakteron de la gazetaro de la Eo-movado (vomado), oni devas konstati, ke ĝi similas pli al la gazetaro de nedemokratiaj ol demokratiaj landoj. Konsiderante la fakton, ke ekzemple la revuoj *Esperanto* (UEA) kaj *La Ondo de Esperanto* estas redaktitaj en Ruslando, la *Unesko-Kuriero* sub la kontrolo de komunisme regata Ĉinio, *Literatura Foiro* eldonita kiel unu el la famekonataj organoj (aŭ almenaŭ paroliloj) de iu kurioza organizaĵo nomata "Civito", kiu disvastigas siajn proprajn verojn, kaj *Libera Folio* kontrolata de iu eksa (?) komunisto, oni ne miras, ke la Tago de la Gazetara Libereco estas ignorata de ĉiuj tiuj organizaĵoj kaj individuoj, kiuj ne hezitas selekte kaj laŭ propra (privata) gusto kaj bontrovo aperigi informojn, jen prisilentante iujn faktojn kaj historiojn, jen disvastigante (stultan) propagandon, jen malhelpante la liberan aliron de esprimantoj de kritikaj voĉoj kaj opinioj. Kvankam unu el tiuj organoj nomiĝas "Libera Folio", ĝi tute ne meritas sian nomon. Post kiam pluraj kontribuantoj estis eliminitaj, ĉar ili esprimis kritikon, kiu ne plaĉis al la funkciiganto de la koncerna retorgano, la nunaj komentantoj ekzercas memcenzuron por eviti la saman trakton de la koncerna redaktoro, kiu evidente decidas ĉion mem.

Oni ne devas aparte mencii la cirkonstancon, ke ĉiuj tiuj (sektemaj kaj politike tendencismaj) gazetaraj organoj komplete prisilentas la situacion de la gazetaro en la koncernaj landoj, ĉar oni kaŝas sin malantaŭ la dogmo de la neŭtraleco. Jam en la tempo de la komunismo la gazetaro de la Eo-movado (vomado) komplete kaj sistemece prisilentadis la verajn okazaĵojn en la komunisme regataj landoj kaj anstataŭ tio apogis rekte aŭ malrekte la propagandon de la koncernaj registaroj. Lige kun tio ŝajnas, ke la Eo-movado (vomado) neniam estis sur la flanko ekzemple de subpremataj ĵurnalistInoj en diversaj landoj, sed preferis havi bonajn rilatojn kun registaroj, ankaŭ diktaturoj, kiuj ŝajne apogis Esperanton. (En la realeco la koncernaj reĝimoj ne apogis Eon, sed celis havi la Eo-movadon sub politika kontrolo, subpremante ĉiujn liberajn opiniojn kaj informojn. La Eo-movado/vomado neniam kritikis tiujn cirkonstancojn, ĉar ĝi timis persekuton de siaj membroj en la koncernaj landoj.)

www.planlingvoj.ch

03-05-2023

Aktualigita rangolisto de „Reporteroj sen limoj“ pri la libereco de la gazetara libereco:
https://www.reporter-ohne-grenzen.de/rangliste/rangliste-2023

Reago de kce@esperantio.net:
„Vi disvastigas mensogo(j)n, sekve ne rajtas pontifiki pri gazetara libereco. "Literatura Foiro" ne estas organo de la Esperanta Civito, sed de LF-koop, kiu proprietas kaj eldonas ĝin ekde 1980. La Esperanta Civito (ekinta en februaro 2002) havas sian propran organon. Gazetara libereco signifas ankaŭ fermi la pordon de gazetoj al mensogantoj, kalumniantoj kaj ciberĉikanuloj.“

(vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Literatura_Foiro)

Post ĉi tiu (kiel kutime anonima) komento sendita de „KCE“ la koncerna ero en la ĉi-supra teksto estis modifita en la koncerna senco.